



RAPORTO: MOTIVADO - KIEL MOTIVIĜI KAJ MOTIVIGI

Wrocław, 07.2016, trejnistoj: Anna, Karina

Enhavo

Enkonduko.....	1
Celoj de la trejnado	2
Ŝlosilvortoj.....	2
Partoprenantoj de la trejnado.....	2
Tejnistoj.....	2
Bezonataĵoj.....	2
Skemo de trejnado	2
Detaloj de trejnado.....	3
Parto 1 – Teoria parto.....	3
Parto 2 – Kiel motivigi?.....	4
Parto 3 – Kiel motiviĝi?.....	5
Sugestoj	5
Observoj de trejnistoj pri trejnado.....	5
Materialoj	5

Enkonduko

Tiu ĉi dokumento estas raporto pri la trejnado „ Motivado – kiel motivigi kaj motiviĝi”, kiu okazis en julio 2016 en Wrocław, kiel parto de la projekto Empower Trainers, Emower Youth.



Celoj de la trejnado

1. Partoprenantoj scipovos defini motivadon kaj ekkonos diversajn teoriojn pri ĝi.
2. Partoprenantoj komprenos teoriojn kaj kapablos doni praktikajn ekzemplojn de iliaj uzoj.
3. Partoprenantoj plibonigos siajn kapablojn pri motivigado.
4. Partoprenantoj uzos siajn novajn konojn por motiviĝi.

Ŝlosilvortoj

motivado, motiviĝo, motivigo, Maslow, ERG teorio, saĝaj celoj

Partoprenantoj de la trejnado

16 personoj, de diversaj landoj, en diversaj aĝoj, partoprenantoj de International Youth Congress 2016 en Wrocław

Tejnistoj

Karina Małkosa, Anna Albert Torres

Bezonataĵoj

Papero A4, papero granda, multkoloraj paperetoj por alglui, skribiloj, ĉambro. glubendo, gluoj

Skemo de trejnado

Horo	Daŭro	Temo	Priskribo
		Teoria parto	
10.00	0:5:00	Bonvenigo	Bonvenigo, agrabla muziko en fono por bonetosigi
10.05	0:10:00	Konatigaj ludoj	
10:15	0:15:00	Defino de motivado	Partoprenantoj en grupoj definas motivadon. Fine komuna resumo.
10:30	0:20:00	Maslow teorio	Partoprenantoj en grupoj ordigas piramidojn. Fine trejnisto klarigas la teorion.
10.50	00:10:00	Kritiko de Maslow	Partoprenantoj en paroj diskutas, ĉu ili konsentas kun Maslow.
11.00	00:15:00	ERG teorio	Trejnistoj klarigas ERG teorion.
		Kiel motiviĝi	
11.15	0:20:00	Ekzerco – “Kiel motiviĝi aliajn”	Ekzerco bazita sur esploro. Ekzerco montras, ke laborantoj ne estas forte motivataj de salajroj.




11.35	0:05:00	Resumo de ekzerco	
11.40	00.10:00	Cerboŝtormo – kiel motivigi aliajn, se ni ne havas monon	
11:50	0:10:00	kafopaŭzo	
		Kiel motivigi	
12.00	0:05:00	Energiga ludo	
12:05:00	0:15:00	Kiel motivigi? Reguloj – kiel motivigi kaj resti motivitaj	Diskuto
12:20:00	0:15:00	Saĝaj celoj	Trejnisto enkondukas teorion de saĝaj celoj
12:35:00	0:10:00	ekzerco	Partoprenantoj starigas por si unu saĝan celon
12:45:00	0:10:00	Resumo/demanded/ FINO	

Detaloj de trejnado

Parto 1 – Teoria parto

- A. **Materialoj** – flip chart, spaco por ludoj kaj ekzercoj en grupoj, skribiloj, papero A4 aux A3, glubendo, komputilo (por muziko)
- B. **Celoj** – partoprenantoj ekkonas teoriojn de homaj bezonoj. Ili komparsa du teoriojn kaj kritikis ilin. Fine ili scias, ke teorioj estas utilaj en praktiko.
- C. **Observoj** – teorio de Maslow postulas malpli da tempo, tamen partopr. Havas problemojn kun bona ordo de piramido kaj ekzemploj. ERG estas nova por preskaŭ ĉiuj, do estas bone koncentriĝi pli je ĝi. Indus aldoni ankoraŭ unu pli novan teorion.
- D. **Rezultoj** – ni havis diskuton pri pravenco de la du teorioj. Partoprenantoj engaĝiĝis forte en diskuto pri pravenco de Maslow kaj ERG.



Parto 2 – Kiel motivigi?

- Materialoj** – paperetoj stickit, flip chart, anatŭpreparitaj materialoj por ekzerco, gluo
- Celoj** – partoprenantoj laboras en grupoj – faras ekzercon. Post ekzerco ili mem rimarkas kiom gravas aprezo kaj engaĝigo e homoj. Partoprenantoj mem elpensas kiel eblas motivigi homojn dum diskuto.
- Observoj** – ekzercon oni devas tre bone klarigi. On iankaux devas aldoni pli detalajn priskribojn al. Motivigiloj, ĉar homoj ne komprenas bone pri kio temas.
- Rezultoj** – ni kreis bazon de ideoj kiel motivigi homojn sen monrimedoj.





Parto 3 – Kiel motivigi?

- A. **Materialoj** – flip chart , skribiloj, paperoj A4,
- B. **Celoj** – partoprenantoj starigas por si mem celoj kaj pripensas kiel sin mem motivigi. Ili povas inspiriĝi de aliaj homoj.
- C. **Observoj** – ni multe diskutis pri tio kiajn maŝinerojn homoj havas por motivigi, partoprenantoj estis emaj por kundiĉi siajn spertojn. Fine ili starigis saĝajn celojn, sed bedaŭrinde sufiĉe haste, ĉar tempo mankis.
- D. **Rezultoj** – partoprenantoj havas rekomendojn kion fari por resti motivita. Ili ankaŭ foriras de kurso kun unu celo por seva duono de jaro.

Sugestoj

Ĝeneralaj opinioj estis tre bonaj. Homoj kontentis pri enhavo, pri ekzercoj kaj pri gvidado de trejnado. Aperis atentigoj pri: pli klare enkonduki taskojn, doni pli da honretal iloj kaj klare dividi kiam temas pri laboro profesia kaj kiam pri volontulado.

Observoj de trejnistoj pri trejnado

Ĝenerale trejnado estis bona, sed kiel ĉiam bezonas plibonigon. Tempo mankis, eblas forĵeti parton – kiel motivigi kaj koncentriĝi je du unuaj partoj. Estus bone doni pli da konkretaj iloj kiel motivigi aliajn kaj koncentriĝi nur je esperantaj organizoj. Eblas aldoni pli da teorioj pri motivigo. Tiu ĉi materialo trankvile sufiĉus por 5 horoj.

Materialoj

Se vi interesiĝas pri materialoj uzitaj por la trejnado demandu al Karina Maĝosa – karinamakosa@gmail.com